Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

auto **30/05/2013 Cent dekkvara Eldono 30/06/2013** SENDITA (unua eldono 26/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rspring@tpg.com.au;

Redaktisto Roger Springer Provlegita de Nicole Else

SENDATA AL 244 RETADRESOJ

La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisdatigatan informon **ABC nova**

Aŭskultu **Retradion en Esperanto ĉiun tagon** Informaj rakontetoj, Bona lingvo,
Programlisto http://esperantaretradio.blogspot.co.at/



ISLANDO, kies historio komenciĝis ĉirkaŭ la jaro 800. (elsendita 26 Majo)

Tiam loĝis jam kelkaj ermitoj, monaĥoj devenintaj el Irlando. Meze en la 9-a jc velis vikingaj boatoj okcidenten al Irlando, kie ili atakis la monaĥejon Lindisfarne en la jaro 793. Tio estis la komenco de la Vikinga periodo. Iom poste la vikingoj trovis Islandon. La irlandaj monaĥoj rapide forfuĝis, kiam la paganoj alvenis. La nomo de la unua nordlandano, kiu ekloĝis en Islando estas Floki Vilgerdarson. Li flugigis tri korvojn, kiuj montris al li, kie troviĝis lando. En la golfo, kien li alvenis troviĝis multe da glacio kaj li donis al la lando la nomon "Islando". En diversaj jarcentoj, la temperaturoj estis tre diversaj ĉe la insulo. Dum la 17-a jc estis tre malvarme "la eta glacia periodo". Landnamabok, la libro, kiu rakontas pri tiuj, kiuj ekloĝis sur Islando, diras ke la unua, kiu prenis al si la landon nomiĝis Ingolfr Arnarson. 874 du fratoj ekloĝis sur la insulo kune kun brutaro kaj sklavoj, kiujn ili rabis dumvoje. Ili flosigis la fostojn de la temploj de la paganaj dioj de hejmo en Norvegio. Tiuj alteriĝis en golfo montrante, ke tie estu ilia nova hejmo. Ili elboatiĝis kaj trovis, ke fumo elvenas el la tero. Ili donis la nomon Rejkjaviko (fuma golfo) al tiu loko. (Malgranda eltiro el la bona reta programo)

Ĉu $241,600 aŭ pli? uzis AEA dum 7 jaroj 2005-2012 Ĉu demisio nuligas respondecon pri informado?


Vintra Lernejo en Junio



Saluton de la Sheidow Park Vintra Lernejo! Vidu sube rapidan mesaĝon pri propono por okazigi malferman vespermanĝon en Adelajdo vendredon la 7an de junio por ke ĉeestantoj povu kuniĝi, babiladi, kaj, espereble, aŭskulti interesan paroladon de eminenta gast-parolanto [ankoraŭ ne invitita :-)]. RETPAĜO por la vintra lernejo http://www.esperanto.com.au/

Gordon Coleman

SYDNEY LANGUAGE FESTIVAL



Macquarie University, Macquarie Park,

konstruaĵo E7B kaj E5A,

Sabaton, la 1an de Junio 2013 je 10:30atm

http://esperantowebdesign.com/sydneylanguagefestival/

http://sydneylanguagefestival.org.au/program/

Pri Esperanto ĝenerale: http://www.worldlanguage.info/

	E7B (T1)	E5A (110)	E5A (120)	E5A (130)	E5A (150)	E5A (160)	E5A (170)	E5A (180)
10:30 am	Introductory talks							
11:00 am		Italian	Kalasha	Chinese	English	Ancient Greek	Esperanto	Croatian
11:30 am	Russian	French	Hindi/Urdu	Japanese	German	Latin	Volapük, Interlingua, Klingon, IDO	Modern Greek
12:00 pm		Spanish	Portuguese	Korean	Hungarian	Old Norse	Fitusa	Polish
12:30 pm	Concert Closing ceremony							



Esperanto-Domo Sidnejo

Trevor Steele alvenos vendredon la 31an de majo. "A Hero Against Nazi Barbarism", 6a horo vespere. Ankaŭ venu dimanĉon la 2an de Junio

Aferkunveno antaŭe je 11atm. Poste amuzkunveno kun manĝetoj.


LETEROJ de la legantoj

Taŭga desegno aŭ foto, ne necesa, sed bonvena





Estas via Esperanto-familio. Informu, Fotoj bonvenaj.



La "KEY" kaj la "Handy Card" naskiĝis. 1000 kopioj. Disdonu, uzu ilin
Lasu kopion ĉe kuracista, dentista, ktp atendejoj, bibliotekoj.

Ĉu vi havas aliajn konsilojn? ideojn?



Adelajdaj esperantistoj sukcese petis la germanan sekcion de la loka etna radiostacio (5EBI) anonci, ke ni volas fari kontakton kun la posteuloj de fruaj germandevenaj esperantistoj en Suda Aŭstralio, specife posteuloj de Major Leschen, s-ro Wittber, kaj s-ro Uhrlaub. Ĝis nun ne estis respondo al la anonco.

Trevor Steele Esperanto Domo, 5ptm por 6ptm 31an de Majo

Universala kongreso en Adelajdo




Hodiaŭ mi enkomputiligis el kasedo la ferman ceremonion de la UK en Adelajdo en 1997. Jen mi jam metis 10 minutojn el ĝi sur Youtube.


http://www.youtube.com/watch?v=oa_3gfEVm0Y

Amike, Nicole


Rekono de vizaĝoj



Je unu flanko oni neniam forgesas vizaĝojn
Je la alia flanko oni eĉ ne rekonas sian vizaĝon sur foto aŭ spegulo



Du procentoj da homoj suferas tiun difekton je iu grado Vizaĝblindeco "prosopagnosia" estas cerba difekto aŭ vundo.



Unu el kvindek havas tiun difekton laŭ iu grado de naskiĝo.
Homoj kun "prosopagnosia" ofte pasas siajn amikojn kaj parencojn en la strato sen rekono kaj alproksimiĝas al la malĝusta persono en butiko aŭ trinkejo. (embarasiga afero)

Kelkaj "prosopagnosics" eĉ ne rekonas sian propran vizaĝon en spegulo aŭ foto.

Pardonu min se mi ne facile rekonas vian vizaĝon Roger Springer